

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝo
Ernest Archdeacon, Pariso
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 187
13. 4. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Kōln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (se antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Pariso, Warszawa

La nunjara Sudslava Esp. Kongreso en Split.

II-a Sudslava Kongreso.

La II-a Sudslava Esperanto Kongreso, kiu okazos dum tiu ĉi jaro en Split, vekis grandan intereson en ĉiuj partoj de nia nuna ŝtato. Ni invitas ĉiujn jugoslavajn samideanojn al partopreno. Sed ni esperas ankaŭ vidi tiukaze eksterlandajn amikojn kaj ni jam nun petas la partoprenantojn kiel ankaŭ la najbarlandajn Esperanto-asociojn fari fortan propagandon inter siaj samlandanoj por nia dua kongreso. Sendube ĝi signos komencon de grava epoko de nia movado en nia lando. Precipe ni petas la bonvol-emajn tutmondajn samideanojn, sendi al ni trajnaj konsilojn kaj proponojn, por ke nia Dua sukcesu en plena senco de l' vorto. Koran antaŭdankon al ĉiuj helpantoj!

Detaloj pri la kongreso, dato, kotizo ktp. sekvos tre baldaŭ.

R. Rupčić,
Del. UEA, prez. de Esp.
Klubo, Palmira 9, Split,
Jugoslavio.

Split (Spalato),

la urbo de la II-a Jugoslava Esperanta Kongreso.

Dalmacio, la malproksime konata ĉarma lando de la montoj, suno kaj maro kun siaj mil insuloj farigas la preferata restadejo de centmiloj da diverslandaj turistoj kaj naturamantoj. Ĉiuj sezonoj havas tie siajn specialajn allogojn: la milda vintro kun ĝoligaj sunaj tagoj, la printempo kun la pompo de la florantaj migdal-, oleandro-kaj granatarboj, la somero kun la mildiga marvento kaj refreŝigaj marbanoj, la aŭtuno kun la ruĝa hederfoliaro kaj la turistvojaĝoj. La senkomparaj panoramoj kun milo da terkoloj, grottoj, fiordoj kaj golfejoj inter la subtropika vegetaĵaro, la historiaj monumentoj kun la famaj restoj el ĉiuj epokoj de la mondhistorio, la ĉefproduktioj de la lando vino kaj olivoleo, la ĉasajo (sakaloj, sovaĝaj cignoj, agloj, pelikanoj, falkoj kaj mevoj) kaj la interesa fiŝkaptado, ĉu per tio ne estas kontentigataj ĉies gustoj?

Split, la ĉefurbo de tiu mirinda sovaĝromantika lando sur la orienta marbordo de la Adriatika maro, invitas vin karaj tutmondaj samideanoj revenantoj de la XVI. Universala Kongreso viziti ĉiun ĉi mirindan landon kaj ĝoligi la fervorajn enlandajn sampensanojn.

Penitrinde ĉirkaŭata de altaj montoj Split kuŝas en fruktodona ĉirkaŭaĵo sur duoninsulo. Ĝia plej fama vidindaĵo estas la mondkonata Palatium Diocletiani, kies grandegaj dimensioj superas la Roman Koloseon. Antaŭ 16 jarcentoj la imperiestro Diokleciano, filo de nia lando, konstruigis ĉiun ĉi palacon kiel sian ripozejon, abdikinte en la jaro 305 je la roma trono. De tiu ĉi giganta konstruaĵo restis ĝis nun konservata ne nur la ĉirkaŭmuregoj, sed ankaŭ gravaj internaj partoj kiel la fame konata maŭzoleo kun la ĉarma peristilo.

Tiu ĉi grandioza konstruaĵo, kiun laŭ ĝia konserviteco kaj beleco oni povas nur kompari kun la roma panteono, estas hodiaŭ la Katedralo de Split.

Flanke de la historiaj vidindaĵoj la turisto ĝuos rigardante la modernajn konstruaĵojn de la plej

1. interrilatojn kun la alilandaj turistaj unuigoj, kun kiuj ĝi tre deziras interŝanĝi siajn eldonaĵojn kaj korespondadi;

2. reklamojn el la tuta mondo por ĝia oficiala organo „Iadnemska Reklamna Revija“ (Adriatika Reklama Revuo). Ĝia formato estas 25x35, ĝi akceptas artikolojn kaj reklamojn en ĉiuj lingvoj kaj estas senpage dissendota unuavice al Turistaj Oficejoj de la en- kaj eksterlando. La reklamoj en la teksto kostas:

tuta pago 120 sv. fk.,
1/2 pago = 70 sv. fk.,
1/4 pago = 40 sv. fk.,
1/8 pago = 25 sv. fk.,
1/16 pago = 15 sv. fk.;
aliaj grandecoj proporcie. Reklamoj ruĝe presotaj 10% pli kare.

Krom tio ni akceptas reklamojn por specialaj eldonaĵoj en Esperanto, kiujn ni dissendos ĉien en la mondo. Formato 10 1/2 x 16 1/2. Prezoj: tuta pago 20 sv. fk. Aliaj grandecoj proporcie.

Fine ankoraŭ du aferoj, kiuj tre interesas nian Turistan Oficejon. Tio estas:

3. la festo de la arboj (angle: Arbor's Day). Ĉiuj estas petataj, doni detalajn informojn pri similaj festoj dum la printempo, kiam la studentaro plantas arbojn en la lokoj, kie oni deziras havi arbaron.

4. Esperantaj gvidlibroj. La Turista Oficejo en Split havas jam esperantan sektion en sia biblioteko (24 gvidlibroj). Ni petas alsendon de pluaĵ.

La devo de ĉiuj samideanoj estas helpi nin en tiu ĉi kultura laboro. Oni devus pruvu al nia Turista Oficejo, ke per Esperanto ni povas akiri la plej valorajn interrilatojn kun la tuta mondo.

Kun antaŭdanko mi rekomendas al ĉiuj delegitoj kaj membroj de UEA afablan atenton. R.R.


Ekskursoj sur la Adriatiko

Kiu volas konatiĝi kun la mirinda lando de la suno kaj de la maro, havas tre belan okazon partoprenonte la ekskursojn, kiujn aranĝas la Turista Oficejo en Split per la eleganta ŝipo „Nirvana“. Estas projektitaj 10 ekskursoj laŭ jena programo: 1. 1—15 majo 1924 Suŝak—Dubrovnik; 2. 18 majo ĝis 2 junio Dubrovnik—Suŝak; 3. 5—17 junio Suŝak—Split; 4. 20 junio ĝis 2 julio Split—Kotor; 5. 5—17 julio Kotor—Split; 6. 19—31 julio Split—Gruĝ; 7. 3—18 aŭg. Gruĝ—Suŝak; 8. 20—28 aŭg. Suŝak—Rub kaj ree, la 9. kaj 10. ekskursojn aranĝas la Turista Unuigo en Praha. „Nirvana“ posedas la tutan komforton (kajutoj kun du litoj, bonega kuirejo, fiŝkaptiloj, muzikinstrumentoj ktp.) por 24 ekskursantoj, ĝi vizitotas la plej rimarkindajn lokojn de la jugoslava marbordo. La prezo por la vojaĝado kaj plena komforto estas 180 din. tage (= 14 sv. fk.). La ekskursantoj anoncu sin 10 tagojn antaŭ ĉi vojaĝo al la Turista Oficejo (Telegramoj; Putnik, Split) au al la del. de UEA.

La samideanoj, kiuj reveninte de la Deksesa deziras traverti nian landon kaj viziti Dalmacion,

Vidajo de Split (Spalato).

(Kliŝo afable disponigita de la „Turista Oficejo Split“).



granda havenurbo de Jugoslavio. Kiam vi suprenrampas la monumentosimilan ŝtuparon ĝis la pinto de la verda monto Marjan, senkompara vidajo ĝoligas vian okulon, ravaj panoramoj malfermiĝas je ĉiu flanko: antaŭ vi la tuta urbo, la vasta maro kun la insularo, post vi la ĉarma golfo de la „Sep Kasteloj“, la konata somerrestadejo, la ruinoj de Solin (Salonae), la forikaĵo Klis (Clissa) kaj la montaro.

Ekskursoj al la proksima ĉirkaŭaĵo: Solin, konstruita sur la ruinoj de la antikva Salonae, en roma epoko la ĉefurbo de Dalmacio, detruita de la goloj, hunoj kaj avaroj. Ĝi estas la jugoslava „Pompeji“. La „Sep Kasteloj“, tiu ĉi dalmacia paradizo, montras la sudan naturon en ĝia plena pompo. Densaj olivarbaretoj, vinberoj, cipresoj, agavoj kaj oleandroj invitas vin ripozi iomete en ilia ombro. La blua maro karesanta la marbordon distras viajn zorgojn. Daŭrigante la vojon vi atingas la de la grekoj konstruitan urbeton Trogir (Tragurium ĉe la romanoj) kun historiaj monumentoj precipe el la Venecia epoko. De la insuloj vidindaj estas Hvar (Lesina), la jugoslava Madeira, Vis (Lissa), fama per sia vino, kaj Biŝevo, per la blua grotto, kiu konkuras kun Capri pro sia ĉarma beleco kaj kolordiverseco.

Samideanoj, ne preterlasu la belan okazon vidi nian admirindan landon, kiu rezervas por vi ankoraŭ centon da aliaj surprizoj. La alta kompreno de la „nova sento“ en Dalmacio estas alia logilo por viaj koroj. Tri jarojn ni laboris, semis, predikis kaj edukis niajn samlandanojn. El nenio fariĝis en mallonga tempo forte pulsanta movado, kies centro estas la lulilo de la jugoslava literaturo, la bela urbo de nia II-a kongreso — Split. R.R.

La Turista Unuigo en Dalmacio.

La „Turista Unuigo“ en Dalmacio tre favoras Esperanton, kaj mi turnas min en ĝia nomo al vi, ĉiulandaj samideanoj, por havigi al ĝi:

El vivo de nia Majstro.

Antaŭ nelonge mi konatiĝis kun iu sinjoro Z., kiu rakontis al mi pri nia Majstro. Li konis lin persone de sia infaneco kaj konatiĝis ĉe jenaj cirkonstancoj.

Li havis tiam kvin-ses jarojn kaj ricevis ian ŝvelaĵon sur la okulo. Liaj gepatroj kondukis lin al famekonata doktoro-okulisto Zamenhof. Li, kiel infano, tre timis operacion, kiun devis fari al li la doktoro, kaj dum vojo ploris per plej maldolĉaj larmoj, precipe kiam la gepatroj venigis lin en loĝejon de la doktoro. Tamen kiam li ekvidis la doktoron, kiu estis ankoraŭ sufiĉe juna homo kun nigra barbo kaj sen blanka antaŭtuko, kiun li nepre prezentis al si sur ĉiu doktoro kiel simbolon de lia terura profesio, li ĉesis plori: la doktoro tuj ekplaĉis al li. Kiam do tiu ĉi doktoro prenis lin sur siajn brakojn kaj donis al li belefan tranĉileton kiel ludilon, li komencis gaje babiladi kun li: montriĝis, ke la doktoro tute ne estas tiel terura, kiel ŝajnis antaŭe al lia ekscitita imago. Dum kelke da minutoj la doktoro ludis kun li kaj poste ekpetis, ke li redonu al li la belefan tranĉileton por unu momento. Li redonis kaj ne havis tempon eĉ palpebrumi, kiam la doktoro per la sama tranĉileto tratranĉis lian ŝvelaĵon... La operacio estis finita kaj an-

AL MAJSTRO.

Okaze de lia mortotago 14 aprilo.

*En niaj brustoj vi kreis flamon,
Por idealo vi vekis amon,
Vi en malforto — nia konsolo,
Estu benata, ho apostolo!*

*Ĝis lasta spiro, ĝis lasta guto
Staros ni firme sur la reduro,
Staros ni firme apud standardo
Kun flama koro, plena de ardo.*

*Malgraŭ malhelpoj, pena laboro
Ne eksilentos jam nia horo,
Kiu leviĝas super la tero
Per granda himno de la espero.*

*Kaj kiam venos moment' de morto,
La agonio lasta jam vorto
Estos: ho vivu esperu sento,
Majstro, standardo kaj fundamento.*

*En niaj brustoj vi kreis flamon,
Por idealo vi vekis amon,
Vi en malforto — nia konsolo —
Estu benata, ho apostolo!*

Stanislaw Braun, Łódź

taŭna doloro ĉesis... La infano konsterniĝis kaj ne sciis, kion fari: aŭ plori pro la farita al li operacio, aŭ ĝoji por tio, ke ĝi jam pasis... Sed li bone sciis, ke la gepatroj

faris al li grandan malĝojon, kiam post kelkaj minutoj ili lin deprenis de la genuoj de la doktoro kaj rekondukis hejmen: li neniel deziris disiĝi de belefaj tranĉiletoj kaj precipe de la tiel simpata kaj ludema doktoro. Kaj li denove ploris per la samaj maldolĉaj larmoj, kiam la gepatroj kondukis lin el loĝejo de la terura doktoro...

La rakontita sceneto bone karakterizas interrilatojn inter nia Majstro kaj liaj pacientoj kaj ĝenerale ĉiuj liaj konatuloj: lia bona koro estis ĉarmanta ĉiujn kaj, ŝajnas, li tute ne havis malamikojn. Precipe do amis lin liaj malriĉaj pacientoj, de kiuj li ne nur ne preadis monon, sed al kiuj li ĉiamaniere mem helpadis. Li havis multe da amiko inter la geinfanaro, — precipe hebrea, ĉar li loĝis en hebrea parto de Varsovio (strato Dzika n-o 9). Ne malproksime de li troviĝis unua en Warszawa hebrea ĝardeno por geinfanoj (laŭ Fröbel'a sistemo), al kies fondo D-o Zamenhof multe helpis. Kaj poste preterpasante tiun ĝardenon, li ĉiam eniris ĝin, kaj la geinfanaro tuj ĉirkaŭadis lin, gaje babiladis kaj petoladis kun li...

Ĉu ĉio ĉi ne estas tre karakteriza por la spirito de nia Majstro, la eltrovinto de internacia helpingo — helpilo por la homaro, suferanta pro nekompreniĝo reciproka?

A. Andrejev, Tiflis (Georgio).

bonvolu kiel eble plej baldaŭ min sciigi per fiski programon de eventuale aranĝota „Internacia Semajno ĉe la Adriatiko“ kaj havigi rabaton ĉe la fervojo.

R.R.

Esperanto-Akademio.

Sekcio por la teknikaj kaj sciencaj vortaroj.

Tria Cirkulero.

Per la 1-a Cirkulero (aŭg. 1922) la Direktoro de la Sekcio klarigis ĝeneralan labormetodon kaj donis utilajn konsilojn al la bonvolemaj kunlaborantoj.

Per la 2-a (marto 1923) li sciigis la interesojn pri la aliĝo de 103 samideanoj pretaj por komenci sian kunlaboradon kaj publikigis unuan nomaron de fakestroj; plena listo de la manuskriptoj konservataj en niaj arĥivoj estis samtempe konigata.

Per la nuna 3-a Cirkulero, la Direktoro de la Sekcio denove insistas, por ke aliĝu kaj enskribiĝu novaj kunlaborantoj, por ke la jam aliĝintaj samideanoj bonvolu atente konsideri la eblecon fariĝi fakestroj, en ia fako de la ĝenerala tekniko aŭ en sia propra profesio aŭ metio.

Por faciligi ilian decidon kaj montri al ili la ĝustan vojon, ni ĉi sube donas la liston de la temoj, super kiuj jam nuntempe laboras kelkaj fakestroj, helpataj de alinaciecaj kompetentuloj:

Medicino. — Fakestro: D-o Briquet, 31, rue de la Bassée, Lille, Francujo.

Vitraĵoj. — Fakestro: s-o Balliman, 5, rue de Provence, Paris.

Kudromaŝino. — S-o Brunet, mekanikisto, 59, cours Victor-Hugo, Bordeaux, Gironde, Francujo.

Meblofabrikado. — Fakestro: S-o Karl Fröding, 419, Seventh str., Rockford (Ill.), Usono.

Fervojoj. — Fakestro: S-o Edw. M. Roshar, ing., 125 A, Beulah str., San Francisco, Usono.

Telegrafo, Telefono, T.S.F. — Fakestro: S-o R. Raven Hart, Union Club, Necochea y Perú, Mendoza, Argentino.

Geologio. — Fakestro: S-o S. Obručev, Arbat, Kaloŝin per 4 Kv. 8, Moskvo, Rusujo.

Zoologio. — Fakestro: S-o Schröder, en Wien, Aŭstrujo.

Dogano. — Fakestro: S-o R. Maraury, en Salamanca, Hisp.

Abelkulturo. — Fakestro: S-o Pastro Siegel, en Unterlauter, Coburg, Germanujo.

Muzikaj instrumentoj. — Fakestro: S-o W. Kalitke, en Posnan, Polujo.

Librotenado, Librobindado. — Fakestro: S-o König Lajos, en Miskolcz, Hungarujo.

Filatelio. — Fakestro: S-o H. M. Scott, en Moundsville, Usono.

Banko. — Fakestro: S-o Delanoue, 4, rue Charles-Divry, Paris-14.

Komerco ĝenerala. — Fakestro: Societo «Esperanto & Komercio». Sekr.: S-o Dény, 20, rue de l'Arc-de-Triomphe, Paris.

Progresas do nia afero; sed restas ankoraŭ tro multe da fakoj pristudotaj, kiuj atendas sian fakestron...

De nun estas dezirinde, ke ĉiu el la supre nomitaj fakestroj bonvolu sciigi nin, almenaŭ

unu-du foje dum la jaro, pri la stato de la laboro efektivigita sub sia gvidado; tion jam faris kelkaj el ili, i.a. S-o E. M. Roshar, fakestro pri Fervojaj terminaro: jen laŭdinda kaj imitinda ekzemplo.

S-o Ing. Pratley, el Wesmount, Québec, sendis du ekz. de grava terminaro pri Pontokonstruado. S-o José Paluzie, el Barcelona, Hisp., sendis du ekz. de verko pri Ŝakterminaro.

S-o H. Dubuisson, 18, rue Bellevue, Le Havre, Francujo, sendis 10-paĝan nomaron de iloj kaj aparatoj por elektra lum- kaj sonorigado, telefonkaj telegrafado.

S-o Casto Juarez sendis liston pri piedpilko-ludo.

S-o Balliman, el Paris, fakestro, sendis sian specialan laboron pri domvitrtoj kaj glacoj; ni elĉerpas el tiu proponita terminaro kelkajn novkreitajn vortojn, pri kiuj estas dezirinda la opinio de la kompetentuloj, kiuj eventuale legos tiujn liniojn.

Bizelo: fr. biseau — angl. bevel — germ. Facette — hol. facet — it. bisello (molatura) — hisp. bisel — port. bisel.

Ĉanfro: fr. chanfrein — angl. chamfer — germ. schräger Schliff — hol. facet poli — it. piccolo bisello — hisp. chanfrán — port. chanfrado.

Domvitrto: fr. verre à vitres — angl. window glass — germ. Fensterglas — hol. vensterglas — it. vetro soffiato — hisp. vidrio soplado — port. vidro de vidraça.

Falzo: fr. feuilure — angl. sash — germ. innerer Falz — hol. sponning — it. scanalatura — hisp. ranura — port. entalhe.

Glaco: fr. glace — angl. polished plate glass — germ. Spiegelglas — hol. spiegelglas — it. cristallo — hisp. luna — port. vidro.

Retumita: fr. armé — angl. wired — germ. mitdrahteinlage — hol. med. draad — it. retinato — hisp. armado — port. armada.

Smota: fr. douci — angl. smoothed — germ. schleife — hol. gesavonneerd — it. arruotato — hisp. desbastado — port. amaciado.

Vitrilo: fr. vitrail — angl. leaded light — germ. Kirchenfenster — hol. kerkraam — it. invetriata — hisp. vidriera — port. vitral.

La novefondita Societo «Esperanto kaj Komercio» decidis entrepreni la taskon pri la komuna terminoj de la ĝenerala komercio; tiu Societo baldaŭ skribos al similaj eksterfrancaj societoj por ke ili partoprenu la tiom bezonatan kaj urĝantan laboron.

Marto 1924.

La Direktoro:
Rollet de l'Isle,
35, rue du Sommerard, Paris.

PS. — Du preseraroj enŝoviĝis en la 2-a Cirkulero. Sur la paĝo 3-a, linio 1-a, oni devis legi: Geometria terminaro (A. Mazzolini). Sur la sama paĝo, legu vol. I de Vortaro Scholmann... anstataŭ vol. III.

Rimarko de la Redakcio: Koncerne la nove proponitajn fakvortojn ni konsistas en konsento kun fakuloj, ke neniu el la proponitaj fakvortoj estas akceptinda. Bizelo kaj ĉanfro estas nek trafaj, nek internaciaj. Sufiĉas ĝisnunaj facitiviro kaj duonklinrando. Fenestrovitrto, ekzemple ankaŭ uzata por vagonfenestroj, estas preferinda al domvitrto. Falzo estas superflua, post kiam ekzistas foldo (laŭ Zamenhof) sekve feuilure ktp. — interna foldo. Glaco estas superflua. Spiegulvitrto estas pli simpla kaj multe pli klara. Por „retumita“ estas preferinda „retarmita“. Smota estas neinternacia, eĉ malkomprenebla al angloj, el kies lingvo la vorto estas derivata. Ĝi montras aŭ la neceson de l' kreo de vorto por schleifen, polir (douce) ktp. aŭ

etendigon de l' percepto poluri super la sferon de l' vitro. Poluri tamen ne akurate enhavas la sencon de l' signifo teknika. Ankaŭ vitralo estas superflua kaj ne ĝusta. Sufiĉas kolorvitraĵo (preĝeja ktp.)

Ni rekomendas al praktikistoj kaj speciale al fakanoj nepre sendi siajn rimarkojn al la direktoro de la sekcio por akceli la laborojn tiom utilajn por la praktikado de nia ĉiutage pli kaj pli disvastigata helpingo.

Esperanto en la malliberejo.

La direktoro de la Nürnberg'a ĉefmalliberejo, supera registara konsilisto D-o Kahl, tre simpatias kun Esperanto kaj ankaŭ estis honora komitatano de nia Dekkvina. Pasintan someron li petis min, paroladi antaŭ la malliberuloj pri Esperanto, kaj volonte mi plenumis lian deziron, kvankam kelkaj el niaj samideanoj ridis pri tia ideo. Lun dimanĉon de junio posttagmeze mi iris en la malliberejon kaj estis kondukita de s-o direktoro al la placo, kiu troviĝas meze de la granda koridoraro. En ĉi tiu placo unuiĝas kiel radioj kvar longaj koridoroj, flanke de kiuj en tri etaĝoj kuŝas la ĉeloj de la malliberuloj, laborejoj, kuirejoj ktp. Kiam ni alvenis sur la placo, tie jam sidis ĉirkaŭe 80 malliberuloj kun 20 gardistoj; ili leviĝis ĉe nia aliro kaj residiĝis laŭ komando de la direktoro, kiu per kelkaj vortoj prologis mian paroladon.

Ekokupis min efektive iom premeĝa impresio, kiam mi al tiom stranga ĉeestantaro estis predikonta la evangelion de Esperanto kaj Esperantismo: certe pro tio mi ne tuj trovis la ĝustan, liberan tonon. Sed sentante kaj vidante, ke ĉiuj kun streĉita atento kaj viglegaj okuloj aŭskultis kaj kvazaŭ ĉiun vorton ĉerpis de miaj lipoj, mi kuragiĝis. Kompreneble mi adaptis miajn dirojn al la situacio de mia aŭdantaro kaj akcentis ĉi tiujn preferojn kaj ĉarmojn de Esperanto, kiuj efikas al la animo de homoj malhavantaj la liberecon. Mi pentris al ili la bildon de niaj universaliaj kongresoj kaj priskribis la praktikajn kaj idealajn ĝuojn, kiujn la venko de nia movado alportos al la homaro. Fine mi per gramatikaj klarigoj kaj literaturaj recitadoj pruis la simplecon kaj belsonecon de Esperanto.

Kiam mi estis fininta, laŭ la naturo de la loko neniu aplaŭdado aŭdiĝis, tamen la gajaj vizaĝoj de ĉiuj ĉeestantoj montris al mi pli bone ol brua manklakado, ke la semo enmetita en tiujn ĉi korojn ne tute perdiĝis. Kortuŝite kaj mediteme, rememorante iun vesperon, je kiu mi kiel sola vidulo estis parolinta ĉe 50 blinduloj, mi forlasis la punejon kaj regajnis la liberan, freŝan aeron.

Kelkajn tagojn poste s-o D-o Kahl komunikis al mi, ke multaj el la malliberuloj deziregas lerni Esperanton; li priparolis kun mi, ĉu kaj kiel estas fareble kontentigi ilin. Ni interkonsentis, ke tiuj el la malliberuloj, kiuj distingigas per bona konduto kaj montras bonajn talentojn, ricevu gramatikon kaj kajeron, kaj ke mi pomonate dufoje vizitu la lernantojn por kontroli iliajn studojn. De tiam mi efektive instruas Esperanton en la malliberejo, kaj la rezultoj estas la plej bonaj, kiujn mi spertis dum mia 16-jara kursegvado. Tute ne mirinde! La lernantoj estas feliĉaj, ke la lernado donas al ili distriĝon kaj fortunon la pensojn de ilia malĝoja sorto.

La plej multaj el ĉi tiuj lernantoj nur scias sian gepatran lingvon, tamen ili bone progresas.

precipe ili kun granda fervoro lernas la esperantajn vortojn. Danke al tio multaj el ili jam sufiĉe bone parolas Esperanton. Ĉar ili nur tre malofte rajtas intertrati unu kun la alia, mi rekomendas al ili, priparoli kun si mem esperante siajn pensojn. Per tio ili ne nur havas ekzercon, sed ankaŭ ekscias, kiuj vortoj kaj esprimoj mankas al ili. Komence de mia instruado unu post la alia direktas al mi siajn dubojn kaj informojn; ofte tiaj tre subtilaj demandoj pravas al mi la delikatan lingvosenton de nekleruloj. Tiuj ĉi lecionoj, kiujn ĉiam ĉeestas la ĉefinstruisto de la malliberejo, ankaŭ diferencigas en tiu punkto de aliaj kursoj, ke la kursanoj neniam mankas kaj malpliĝas, sed male ilia nombro konstante kreskas.

Tre grave estas, ke la lernantoj havu bonajn esperantajn tekstojn, por perfektigi. Eble kelkaj el niaj samideanoj, kiuj aprobas mian agadon, havas la afablecon, sendi al mi esperantajn librojn por la mallibereja biblioteko. Interesas min ankaŭ, ĉu ililoke en malliberejo Esperanto estas instruata. Eble ankaŭ tiuj ĉi linioj allogas aliajn samideanojn, imiti mian ekzemplon.

D-o Orthal, advokato, Nürnberg.

X-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Verkoj ricevitaj ĝis 31 marto.

(Daŭrigo).

- 16. Ŝlosita pord' katenas min. — 17. Siberujo. — 18. Ŝatano de l' alta kaj ideala ĉe la popolo. — 19. Tamen. — 20. Eĉ en doloro ni estu ĝojaj! — 21. Mondon lumigas — verda la stelo. — 22. Ordinareco. — 23. Maska grimaco. — 24. Pacemo. — 25. Blanka rozo. — 26. Katolikismo kaj Paco. — 27. Gaja svato. — 28 La Folio de Leonardo da Vinci. — 29. Kristnaska meso en la kapelo de monteto. — 30. Remember. — 31. Mizero kaj espero. — 32. Homo sum, nihil humani me alienum est. — 33. Ne bezonante rigardi, kion diras aŭ havas aliaj, ĉiu povas alporti sian ŝtonon por la kreskanta konstruaĵo. — 34 Nenia ŝtono perdiĝos. — 35. Trompo sin mem trompas. — 36. Trosatigo malsanigis. — 37. Ni evitu falsajojn. — 38. Se junioj scias — se grandaĵo povus . . . — 39. Kie estas homo, kiu ne mensogas? —

Tiuj unuaj 39 verkoj ricevitaj por la Literatura Konkurso alvenis el la jenaj 9 landoj:

Anglujo 9, Germanujo 6, Polujo 6, Rusujo 5, Svisujo 5, Francujo 5, Italujo 2, Katalunujo 2, Ĉeĥoslovakujo 1.

Pliaj konkursajoj estos akceptataj ĝis la 15 aprilo. La festo de la Floraj Ludoj okazos la 9 junio en Vich, dum la XI-a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Petu informojn de la Sekretario de la F. L., s-o Jaume Grau Casas, Claris 72, Barcelona (Katalunujo).

Prof. Baudouin de Courtenay pri Esperanto.

La fama lingvisto havis la 27. 3. prelegon en Kraków laŭ speciala invito de unu el krakovaj klerigaj societoj pri la temo: „La nacieca problemo“. La subskribinto uzis tiun ĉi okazon, por intervjui la eminentan scienculon por nia gazetaro, speciale por ET.

(Daŭrigo sur 3-a kolono)

Esperanta festo de estona lernejo.

La esperanta movado en la ĉefurbo de Estonio Tallinn (Reval) estas trete vigla. Laboras du societoj (ĉiusemajnaj kunvenoj — debatoj, paroladoj, konversacio nur en Esperanto), funkcias deko da kursoj. Sur la stratoj estas aĉeteblaj „ET“ kaj „Literatura Mondo“. — En Tallinn troviĝas la sekretariejo de Esp.-Asocio de Estonio, kiu cetere eldonas ĉiumonatan ilustritan gazeton „Informo de Esperanto-Asocio de Estonio“. Pro tio la lokaj gazetoj ofte aperigas sciigojn pri la esperanta movado.

Bedaŭrinde la enlanda instruistaro rilatas iom indiferece al nia movado. Lasttempe komencita Esperanto kurso por instruistoj (gvidanto inĝeniero



Esperanta horo ĉe la 2-a urba elementlernejo en Tallinn. En la mezo la instruistinoj: A. Hunt, E. Lübek, H. Valdman. (Foto D. Poska.)

V. Vaher) promesis iom plibonigi tiun staton. Kiel tre efikan rimedon por la intereso de la loka instruistaro pri nia afero oni devas konsideri la sukcesan instruadon de la lingvo en lernejoj.

F-lino Elli Lübek, instruistino en la 2-a urba elementa lernejo de Tallinn, havas la grandan meriton, ke ŝi unue ekinstruis Esperanton en estonia lernejo — per dankinda oficiala aprobo de la lernejestrino s-ino Ollik kaj permeso de la urba kleroficejo. Fruktojn de tiu unujara instruado oni prezentis dum esp. festvespero aranĝita de la lernejo la 1 marto ĉi-jare. La nuresperanta programo el pli ol 15 prezentatoj tute sukcesis, ĝi estis atentita interese eĉ de nekomprenantoj Esperanto. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj, gepatroj kaj gastoj.

La senpartia grava ĵurnalo „Päevaleht“ raportis i. a. jene:

„Oni efektive ne troas, dirante, ke la aŭskultantojn miregigis la eleganta fluoco, lerteco kaj klara elparolado, per kiu 12-, 13-jaraj knabinoj kaj teatraĵojn . . . infanoj, kiuj estis lernintaj la lingvon apenaŭ unu jaron. Tio parolas pli klare je favoro de la lingvo internacia ol dek paroladoj aŭ cent plujaj argumentoj.“ La ĵurnalo fine rekomendas al la instruistoj fari la neeviteblajn konkludojn: ili lernu Esperanton kaj instruu ĝin al la ĵunularo, komence fakultative.

S-anino E. Lübek daŭrigos la instruadon, ĉar anonciĝis pluj lernemulinoj. Oni preskaŭ povas konstati, ke Esperanto estas nuntempe la plej ŝatata lernaĵo en la 2-a el. lernejo. Hisa

Prof. B. de Courtenay, laŭ peto de W. Ostwald, partoprenis en 1907 en la „Delegacio por adopto de lingvo internacia“. Lin interesis la afero ĉefe de lingva vidpunkto. Pri rilato inter Esperanto kaj la problemo nacieca Prof. Courtenay ne scias diri multon. Laŭ lia opinio, Esperanto — aliaj artingvoj ne povas kompariĝi kun la plej multe divastiĝinta Esperanto — povas ludi sole la rolon de praktika helplingvo. Ĝi estas trege facila, en ĝi mankas homonimoj, estas logikeco, ĝi estas akirebla eĉ de neinstruitaj homoj, tute alie ol lingvoj naturaj, ekz. franca aŭ angla.

Klare difinas la negativan vidpunkton de B. de Courtenay pri la rolo de Esperanto en la sociala movadoj, ke al la rekta demando de la intervjuanto: Ĉu Esperanto havas signifon por la mildigo de la nacieca problemoj? Courtenay simple respondis: „Kiam oni propagandas la lingvon Esperanton, oni povas por agitataj celoj paroli pri internacia frateco . . .“

Kaj tamen, en la fino de la intervjuo, Prof. Courtenay ne povis ne konfesi, ke internacia praktika kunlaborado de la nacioj pere de Esperanto akcelas per si mem la interpopolan amikecon. Eĉ Prof. Courtenay promesis, en sia parolado ektuŝi nian aferon.

Leo Dreher, L. K.

Esp. Radioprezentado en Usono.

La 1 majo vespere je la 7-a ĝis 11-a h. de stacio W. I. P. Gimbel Fratoj en Philadelphia (Usono) estos dissendataj radiotelefono salutaj kaj muzik-programo en Esperanto kaj en angla lingvo. Aŭskultintoj estas petataj informi pri la aŭdo-rezulto la arangitojn: W. I. P. Gimbel Brothers, Philadelphia (U. S. A.)

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legelibe (precipe nomoj).

Azio.

Java insulo (Nederlanda Hindujo).

La intereso por Esperanto pligrandiĝas, speciale inter la indigena loĝantaro. Fervora malaja samideano s-o K. Wirjosaksono en Klaten nun eldonas senavere propagandan gazeton „India Esperantisto“ en malaja lingvo kun lecionoj de Esperanto. Malaja gramatiko de Esperanto, verkita de nederlanda samideano P. W. v. d. Broek (nun en Leiden) baldaŭ aperos.

Samosa insulo (Grekujo).

Post longa kaj detala ekzameno de la Regularo per la enlanda ĵuĝistaro, la Samosa Tribunalo decidis favore por la akcepto de la submetita regularo de Samosa Esp. Societo, kiu per tio definitive estis legigita. Post 12-jara interrompo de la laboro la societo nun rekomencis sian funkcion.

Ekzistas vigla intereso pri korespondado kun eksterlando.

Turkujo.

En Konia, malnova samideano kaj eksdel de UEA, s-o poŝtdirektoro Sidki denove propagandas por Esperanto. Kurso komenciĝos.

Eŭropo.

Ĉeĥoslovakio.

Praha. En la dusemajna gazeto „Illas Národní Obrany“ en Praha aperas regule monata Esperanto-paĝo, kiu enhavas ekzercojn por komencantoj kaj diversajn sciigojn pri la esp. movado en boĥemia lingvo. Rubrikon gvidas s-ano K. M. Vodňanský.

21 marto, kaj laŭ tio la kalendaro estas aranĝita. — Pro la elkaŭlo de la paska festo la epektaj estas aplikataj, la nombro, kiu indikas la aĝon de la luno je la novjartago, tiel estas la nombro de la tagoj, kiuj estas pasantaj de post la lasta nova luno en la malnova jaro. — Pro tio ke 12 sinodaj lunonatoj sumigas je 354 tagoj, 8 horoj kaj 48 1/2 minutoj, do estas 10 tagojn kaj 21 horojn pli mallongaj ol la juliana jaro de 365 1/2 tagoj, kutima deposti la kalendaro reformo de Julio Cesaro en la jaro 46 antaŭ la naskiĝo de Kristo, la irado de la luno ĉiujare postrestas je 11 tagoj: la epakto do grandigas ĉiujare je 11 (se ĝi superas 30, tiam 30 estas subtrahata, ĉar nun la luno ja plenumis unu cirkulaĵon). Kaj ĉar 19 julianaj jaroj por 365 tagoj estas nur 1 1/4 horoj pli grandaj ol kompletaj 255 monatoj, la epaktoj revenas ĉiujn 19 jarojn en la sama vico. (Malgrandajn prokastrojn, kiuj estas egaligataj laŭ definitiva metodo, oni povas ignori ĉi ĉi.) — La jaroj do estas dividitaj en grupojn po 19 kaj la numero de la jaro en tiu ĉi grupo estas la „ora nombro“, kiu estas notata en ĉiu kalendaro. Oni ankaŭ povas simple elkaŭliki ĉiun, adicente la unuan jaron kaj dividante per 19: la diferenco estas la numero de la jaro en la ciklo, la ora nombro. — Por ĉiu ora nombro la epakto estas fikсата, por la nombro unu ĝi estas observata, por ĉiuj sekvantaj ĝi estas elkaŭlata per adicio de 11. La jaro 1924 havas la oran nombron 6 (1924 — 1 = 19, diferenco 6); por la ora nombro 6 la epakto estas XXIV. Al la epakto XXIV respondas la paska plenluno de la 19 aprilo, kaj ĉar ĉi tiu estas sabato, pasko estas la 20 aprilo. La solvo de enigmo do estas ke la fakte observita printempa komenco kaj la elkaŭlita per la malnova metodo okaze povas diflasi je unu kalendariago. Tio okazis lastfoje en la jaro 1876. Plenluno estis la 8 aprilo, sed laŭ la tabelo je la 9, kaj ĉar la 9 estis dimanĉo, pasko ne estis festata je la 9, sed je la 16 aprilo. Ĉiu skemo ricevas erarojn en la kalendarkalkulado, tial ke la astronomaj nombroj eĉ ne laŭ sekundoj estas konformaj al nia tempodivido, sed iras siajn proprajn vojojn, sendepende de homa faro.

E. Kind, del. de UEA, Euskirchen, Germ.

Esperanta etimologio.

Laŭ invito farita en n-o 174 de ET mi donas jenan noton rilate la liston de sufiksoj kaj prefiksoj, kies devenon penas esplori D-o Vilmos Austerlitz. La notoj riletas precipe al rusa lingvo, la plej konata de mi. Legonto bonvolu memori, ke rusa lingvo preskaŭ ĉiam kaj tute samradikas kun ĉiuj slavaj lingvoj. Krome — mi plenigas la notojn per la montri pri deveno de du esp. finigoj (n, us) kaj pronomoj *mi, vi, ŝi*.

En rusa lingvo sufikso -aĉ- plej bone evidentiĝas nur en la vorto kijaĉa (ĉevalaĉo), en aliaj vortoj ĝi ricevas pli-malpli alian signifon (*mogaaĉ* = cerbulo, *cerbulaĉo*; *silaĉ* = fortulo; *grivaĉ* = kolharulo).

Rilate al la sufikso -iĝ- mi devas diri, ke ĝi nur estas analoga kun sia parenco -ig- kaj tial similas al neniu sufikso en naĉaj lingvoj. Sufikso -ig- ne troviĝas en la rusa.

Sufikso -eg- aŭdiĝas pli malpli bone en multaj rusaj vortoj *rabotjega* = laboregulo; *dobrjega* = bonegulo; *bednjega* = matricigulo ktp.)

Sufikso -an- havis memstaran signifon nur en praslava lingvo. Nun ĝi estas tre ofte uzata kaj nur en fino de vortoj (*graĉane, kievlane, dvorjane, krestjane, mahometane* = urbanoj, kievanoj, nobeloj aŭ anoj de l' korto, vilaĝanoj, mahometanoj).

Sufikso -in- estas rusa en vortoj *sudarinja, guŝinja, monahinja, knjaginja* = sinjorino, aserino, monahino, princino ktp. En la hina ĉi tiu sufikso same havas signifon de virineco.

Sufikso -id- en la rusa sonas kiel -iĉ (*ivaniĉ, Maksim-iĉ, bariĉ* = ivanido, Maksimido, sinjorido ktp.) kaj estas tre uzata.

Sufikso -aj- en rusa sonas kiel -joj en la vortoj *ĉertjoj, platoj, krepljoj* = desegnaĵo, pago, aĵo por apogi (en minje).

Sufikso -ilo- en la rusa havis memstaran signifon nur en antikvo kaj estas multe uzata (*toĉilo, molotilo, broditilo, motovilo* = akriĝilo, draŝilo, fermentilo, movilo).

Sufikso -ar- estas rusa en la vortoj *kustarnik, viŝarnik, slovar, koĉkarnik* = arbetaro, ĉerzujaro, vortaro, arto de elstarajoj en marĉo.

Sufiksoj -ĉjo-, -njo estas multe uzataj (*Filĉa, Peĉĉa, Manja, Sonja* = Filĉjo, Peĉjo, Manjo, Sonjo). Karesaj virinoj en ĉi tiu formo estas uzataj precipe de popolanoj.

Nuna rusa vorto *ja* (mi) en la prarusa samsonis kun esperantia *mi* (*dam — danj — dami = donos mi*) La vortoj *vi* kaj *ŝi* somas en rusa jene: *vi, ŝja* (en fino de vortoj). Esperantia finigo -n- havas devenon el naturaj lingvoj: germana-mainer, persa-mane, rusa-menja, latva-manni, sanskrita-mana, tatare-mani, esperantia-min. Ĉie la vorto mi en akuzativo havas komunan n.

La verba -us- estas mallongigo de l' rusa *uslovnoe* (kondicionalo). Ĝi montras, ke eĉ tiaj mallongaj finigoj kiel -n-, -us-, -o ne estas arifaritaj, sed venas el naturaj lingvoj, kaj tial ni deoas rekta konkludi, ke Esperanto estas lingvo ne arifarita. Ĝi estas meza etimologia formo de ĉiuj indoeŭropaj lingvoj. Kelkaj radikoj en Esperanto samsonas eĉ kun respondaj radikoj en hina kaj tatare lingvoj (sufikvo -in- kaj pronomo min).

Maksim Krjukov, Irkutsk, Gubfo.

Kial pasko ne estis la 23 marto?

Oni priparolas en tiu ĉi jaro tre ofte la daton de la paska festo, ĉar ĝi ne ŝajnas esti konforma al la regulo por tio fikŝita. La paska festo laŭ la decido de la episkopa kunveno en Nicea en la jaro 325 estas festota la unuan dimanĉon post la unua plenluno kiu sekvas al la printempa tagnoktegalo. Tiu ĉi printempa tagnoktegalo okazis en tiu ĉi jaro la 20 marto je la 10 h vespere, kiam la suno eniris en la zodiakan signon de la virŝafo; sed la luno pleniĝis je la 21, do post la tagnoktegalo, kaj la postvenanta dimanĉo estus esinta la pasinta 25 marto. Sed pasko estas kvar semajnojn pli maltruce. Kiel tio akordiĝas? — La printempa tagnoktegalo ne estas denove observata per la fikŝigo de la paska festo: la episkopa kunveno de Nicea estis decidinta, ke la printempa tagnoktegalo okazu je la

Francujo.

Kongreso de „Mediterranea Esp. Federacio“.

Programo.

Dimanĉo, 20 aprilo: 9 h. en la ĉambro de l' „Casal Cataf“ malfermo de la kongreso. 10.50 h. koncerta parto. 12 h. festeno (10 fk.) Posttagmeze: promenado en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. 19 h. komuna vespermanĝo. Lundo, 21 aprilo: 6.45 h. foriro al Céret (40 km). 8.50 h. alveno, akceptado ĉe la stacidomo, promenado en la montaro. 12 h. tagmanĝo apud belaj fontoj. 14 h. en la ĉambro de l' „Union Céretane“ koncerta parto, reprezentado de „L'Héritage Klodarec“ kaj Tie ĉi oni parolas Esperante! 16 h. dancoj. 18 h. reveno al Perpignan kaj foriro de la kongresistoj. Ĉiuj partoprenantoj sendu tiuj siajn aliĝojn al s-o Llech 5, Rue de la Savonnerie, Perpignan.

Negocaj informoj.

La „Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo“ kun centra Oficejo en Brooklyn, Usono, kiu starigis antaŭnelonge Esperantan Fakon, komencis la tradukadon kaj eldonadon de siaj verkoj por la libro „Milionoj, kiuj nun vivas, neniam mortos“, libreto 80-paĝa. Vidu reklamon en tiu ĉi numero!

Grandega disdonado! 15100 bonaj premioj!

Ĉiu, kiu sendas al la ŝuba adreso minimume 50 valorajn poŝtmarkojn aŭ 5 beleajn gazetojn nacilingvaj, prefero pri poŝtmarkoj, komercoteklamoj, anoncoj kaj artoj, ricevos 1 beleajn Esperanto-kalendaron aŭ praktikkan albumon por ĉiunmetado de poŝtmarkoj.

La 100 plej bonaj kaj grandaj sendajloj estas aparte promititaj. La 100 premioj estas: 10 ĝoblbroj bonege ilustritaj; Tra la mondo, 10 grandaj albumoj, 80 aliaj esperantaj. La premioj estos forsendataj tiuj post ricevo. La apartaj premioj estos forsendataj la 15. de majo. — Sendu tempolineo: 31 julio!

Esperanto redakcio estas palataj, bonevole atengitaj al mia premio-disdono.

Siegfried Krafczyk Universala Esperantista Agentejo Gablitzstr.32 Breslau VII Germanujo

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) sen pagob. Aliaj anoncoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezono de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Anoncoj, ĉe kiuj ni devas depreni la pagon de la abonanto, ĉiuj por 30 tagoj anoncetoj prefere prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.—mk, prefero prezo por poŝtlabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

KIU POVAS resendi al ni numerojn elĉerpiĝintajn de ET 180, 182, 184. Skribu tiuj al la redakcio de ET.

LIRĜAS! Serĉas siniorojn ne germanciantajn por samtempa kaj restado en belege lokita alia kuracejo cele de Esperanto-interparolado. Duobla kario kun profesio al Oberpostinspektorei Seit, Regensburg, Oberpostdirektion, Bayern, Germ.

SERĈO. Mi petas bonvolajn informojn pri s-o Nikolao J. Buzni, finita liceajn studojn en 1918 en Simferopol (Rusujo). Dankeme: s-o I. Stender, str. Darzali 25, Bucaresti, Rumanujo.

SUD-AMERIKANO! Helpu pravi la helpemon de la gesamideanaro. Penadu serioze pri oficon en banko komercfirmao aŭ simila entrepreno por korespondisto lerta kaj sperto 10-jara, scipovante lingvojn germanan, esperantan, anglan, francan, italan, hispanan kaj portugalan. Ĉiuj elspezoj estas repagotaj. Mi kondiĝas vian precicon. Skribu al Instruisto Krämer, UEA 21584, Annaberg, Saksujo, Germanujo.

ĈU VI jam legis pri la „Kvakerismo“ kaj „George Fox“? Se ne, skribu al la Esperanta Kolportista Asocio, 64, St. Thomas Rd., London N. 4., Anglujo, kiu nepre sendos al vi senpagajn literaturon en Esperanta aŭ aliaj lingvoj. (Sek. L. Jenkins.)

HELPU, SAMIDEANOJ! trovi miajn karajn amikojn! Kalmeno Szakaly kaj Andreo Szarosta (hungaroj). Ĉu ili estas vivaj? Kia sorta malfacilo ilin trafis kaj kien ili malaperis? Mia adreso: N. D. Sevcugov, str. Sian'ĉna 51, urbo Omsk, Siberio, Rusujo.

ADRESA SANGO. Mi volas korespondadi kun tutmondaj gesamideanoj per il. Pk. kaj L, pri demando de socialaj institucioj kaj medicino. Jen estas mia nova adreso: D-o Munlyong-Koh, Hosen, Kōkaido, Korea, Azio.

JUNA LABORISTO, 24 jara, jam de longa tempo senlabora, serĉas kiujn ajn laborojn. Bonvolu adresi Rudolf Slivka, Wingelstr. 2, Kuptenberg, Steiermark, Aŭstrujo. Li parolas ĉeĥe, germane kaj esperante.

ADRES-SANGO. S-ano L. Sulpo var ŝanĝas la adreson. Pri nova adreso li aparte anoncos en ET.

LA PROPAGANDA KOMISIONO de la Akademio Esperantista Rondo en Warszawa, Eolujto, sciigas, ke en monato majo k. j. okazos ĉe ĝi grandioza lertespero. Ni petas ĉiujn samideanojn kaj esperantajn organizaciojn de la tuta mondo, ke ili bonvolu skribi al ni pri diversaj temoj por nia vespero ĝis plej malfrue la 1 majo k. j. Nia adreso: Sirzcha, Akademio Esperista Rondo, str. Nowy-Swiat 21, Warszawa, Polujo.

ZAMENHOF-BUSTO. 34 cm alta, bronza, ebur- aŭ vaskolora, belege ornamo por ĉiu esperantista kaj grupa hejmo. Prezo 6.50 or-mk aŭ egalvaloro. Mendo ĉe: M. Ehrentauf, Erlurt, Osisir. 1., Germanujo, Poŝtĉeka konto 23943 Erlurt.

Korespondado kaj Interŝanĝo.

Kiu sendas al mi 50-100 PM de sia lando, krom Germanujo, ricevos saman kvanton de mia lando. S-o Hans Studach, Teufen, Appenzell, Svisujo.

Mi deziras korespondi per L kaj il. PK. Mi interŝanĝas PM, precipe kun Nederlando, Svisujo, Grekio, Turkujo kaj Litovio. Mi sendas por PM vdkartojn, gazetojn, librojn laŭ via deziro. Adr. Otto Dietrich, Fürstenau 50, Post Lauenstein (Sachsen), Germanujo.

Du novaj samideanoj gimnazianoj deziras interkorespondadi kun gesamideanoj de la tuta mondo Stefan Petrow, Aleksandrowska 115, Nikola Zazaron, „Ok. bulevard“ 39, Rusĉuk, Bulgarujo.

S-o Alfred Liebig, Ober-Wüstegiersdorf (Schles.), Bahnhof, Germanujo, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

Deziras interŝanĝo de PM (bazo Michel-Ivert). Nur serioza interŝanĝo. Ne sendas unue. G. Mieves, Niederembt (Kreis Berghelm), Reinland, Germanujo.

F-lino Gerda Jürgensen, Kjellerup, Danujo, deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo.

S-o K. H. F. Hamelink, Parallelvejo 157/2, Hago, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. PK kaj L. Interŝanĝas PM kaj fotografaĵojn. Mi respondos kiel eble plej baldaŭ.

F-lino Julia Klein, str. Universitata 5, Cluj, Rumanujo, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun ĉiuj landoj.

S-o Rich. Hartmann, Hermsdorf, Kr Waldenburg, Schles., Germanujo, deziras interŝanĝi il. PK L kaj PM kun la tuta mondo, ankaŭ interŝanĝas portretojn. Mi sendos belajn naturbildojn kaj il. PK de Turkujo, Egiptujo kaj Grekio.

S-o Fujita-Kuinokuse, Kizu Kamome-ĉo — 2 chome, Minamiku, Osaka, Japanujo, volas korespondi kun artistoj, penthistoj kaj skulptistoj, kaj interŝanĝi librojn, gazetojn pri arto.

Du junaj amikoj, R. Greff, 28 rue des Brasse, Bischheim, A. Fillingier, 36 rue des Beuels, Hoenheim, Bas-Rhin, Francujo, deziras korespondi per il. PK (bil.) kaj L kun la tuta mondo. Ankaŭ interŝanĝas PM.

F-lino Cläre Booch, Schanzenstr. 25, Dresden-N., Germanujo, deziras korespondadi kun la tuta mondo per il. PK kaj L, precipe kun samideanoj, kiuj partoprenos la Deksesan en Wien.

Soc. Lab. junularo deziras korespondi per L kaj il. PK kun la tuta mondo. Ni respondos ĉiam. Skribu al s-o Heinz Zimmermann, Herne, Schmittstr. 1, Germanujo.

17-jara fraŭlo deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo. Skribu al fraŭlo Henri Roelans, Esschenstraat 16, Antwerpen, Belgio.

S-o Johano Ferras, Avenida Icaria, 187-2/2, Barcelona, Hispanujo, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj per il. PK kaj L. Ĉiam respondos akurate.

Sekretario de Irkutskaja Gubernia Fako de S. E. U., k-do Babiĉev, A. A. Irkutsk, Zverevskaja str. 14, Siberio, Rusujo, 35-jara fraŭlo, proponas al gesamideanoj interŝanĝon per personaj fotografaĵoj, il. PK kaj L. Temoj laŭ plaĉo. Respondo garantiita.

S-o Josef Weiss, Waldenburg-Altwasser (Schles.), Breslauerstr. 9, Germanujo, deziras interŝanĝi PK, L, ankaŭ PM kun ĉiuj landoj. Mi respondos ĉiam.

Dek kursanoj deziras korespondi per L kaj il. PK kaj interŝanĝi esperantaĵojn kun ĉiuj landoj. Oni skribu al Arno Weigel, Oelsnitz i. Erzgeb., Bahnhofstr. 1, Germ.

Kiu sendas al mi (kolektanto) ĝis 200 PM de sia lando, ricevos samvaloran sendaĵon da germanaj PM. Ĉiu ricevos respondon S-o Fritz Jauer, Marienstr. 1-2, Magdeburg-B., Germanujo.

Deziras korespondi kun eksterlandanoj, escepte Germanujo. Sino Leonine Bauer, linke Brückenstr. 4, s-ino Maria Haidinger, Ringstrasse 51, s-ino M Oppermann, Keplerstrasse 26/2, f-lino Sieglinde Benedikt, Hofgasse 22, ĉiuj en Linz, Aŭstrujo. Ili certe respondos.

20-jara razisto deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo, prefero razistoj. Raimund Rittich, Pischelsdorf, Stiri, Aŭstrio.

Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi PM kaj PK. Nur seriozaj filatelistoj laŭ katalogo Michel, ni ne sendas unue, sed ĉiam respondos. I Skublics, Szent-Imre 22, Kaposvár, Hungarujo.

Miaj knaboj deziras korespondi kun gefraŭloj en alilandoj. Ili estas 18-jaraj, kolektas PM kaj skribas esperante. Nomoj: Ernest S. Jenkins, David L. Jenkins, 64 St. Thomas Rd., Lonĝon N. 4. Anglujo.

Por propagandi la lingvon! Entuziasmojlo ĉie estas petat sendi il. PK kaj L al s-o B. Whalley Sidwell, Rio Hondo, Texas, Usono. Mi konsciencie provos respondi al ĉiuj.

S-o Frans Quist, Folkhögskolan, Prästmon, Sved, deziras korespondi kun gesamideanoj en aliaj landoj en tuta mondo. Aĝo 24 jaroj. Korespondas ankaŭ en germana kaj angla lingvoj per kario kaj L. Ricevos plej volonte librojn kaj gazetojn kaj kontraŭdonos svedajn.

Du amikoj, Otto Winkelmayr, Cluj, Str. Macelarie n-o. 5 kaj D-o Francisco Köllli, farmaciisto, Cluj, Str. Eminescu 1, Rumanujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo.

Samprofesianoj! Ni rusaj studentoj de Elektroteknika Instituto de Ligilo deziras korespondi kun s-oj de la tuta mondo diverseme. Adreso: k-do Leneko, Goro ovskaja 16, Instituto Svazi, Moskva, Rusujo. Akuratan respondon mi garantias.

S-o Miloslav Nemeč, Palĉeko 40, Kyjov na Morave, Ĉeĥoslovakio, bankoficisto, deziras interŝanĝadi il. PK kun ĉiuj landoj kaj korespondadi kun seriozaj gesamideanoj el okcidentaj kaj orientaj — precipe eksterteropaj — ŝtatoj. Interŝanĝas ankaŭ esperantajn, naciajn kaj il. gazetojn kaj PM.

S-o Janis Milbergs, Dzelzscela iela n-o. 1, Aluksne, Latvio, deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. NE deziras ordinarajn germanajn PM. Ne sendas unue, sed ĉiam respondos.

Amase, pofolie (po 100 pecoj) mi fondonas ĉiujn german-respublikajn PM vende aŭ interŝanĝi kontraŭ alilandaj PM, prefero de Sovetrusujo. H. Remers, Luisenstr. 97, Düsseldorf, Germanujo.

S-o Atanas Zakov, selo Sadovec-Lukoviŝko, Bulgarujo, deziras korespondi per il. PK kun gesamideanoj tutmondaj. Ĉiam respondos.

120 diversaj PM de Polujo kun rekomendita alsendo nur sv. fk. 2.— Skribu tiuj al edleono „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Polujo. Postulu ankaŭ prezaron de esp. libroj. Seriozaj PM-interŝanĝitoj serĉataj.

Tri fratroj Richard Tautz, 25-jara, Alfred Tautz, 21-jara kaj Erich Tautz, 20-jara, deziras korespondi per il. PK kaj L kun gesamideanoj de la tuta mondo. Ni respondos certe.

S-o Jakob Zavzin, 2 a rajono, Ĉeĥovskaja ul. N. 19, Dez., Astrahani, Rusujo, deziras interŝanĝi vidajkartoj, L, PM kaj gazetoj kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

S-o Paŭlo Avedvin, volonte interŝanĝos kun seriozaj kolektantoj de PM (novaj kaj malnovaj) el ĉiuj landoj. Adreso: poste restante, Bobruisk, Minskoj gub., Rusujo.

S-o Alfred Wulpes, frizisto, Köln-Flittard, Hauptstr. 75, Germ., deziras korespondadi kun samfakanoj en la tuta mondo.


Por 100-200 ĉiutlandaj PM mi sendos belan manfaritan nezukon (eventuale du laŭ valoro de PM). Mi ankaŭ interŝanĝas PM. S-o Ernst Lederer, vicdel. de UEA, Saez, 324, Ĉeĥosl.

S-o Nedeĉlo Stefanov, Maschinenschule, Varna, Bulgarujo, korespondas per il. PK kaj L pri diversaj temoj, interŝanĝas PM, il. gazetojn kaj naciajn muzikaĵojn kun la tuta mondo. Tuj respondos.

Por perfektigita en esp. lingvo mi serĉas diligentaĵojn gekorespondantojn pri iu ajn temo el tuta mondo. F-lino Wally Steuer, Masaryková ul., Orlovaĉ, Ĉeĥoslovakio, Silezio. [1] Al miaj gekorespondantoj mi sciigas, ke mi haltos la korespondadon en junio por foriro Nederlando. Kiu eble poste deziras daŭrigi, skribu laŭ mia tiama adreso: J. T. Kaptein, Westgracht, Felder, Nederlando. [1] S-o Deziderio Racsmány, Budapest, Czobor u. 124, 7, Hung., deziras interŝanĝi PM. Ne sendas unue, sed nepre kaj honeste al ĉiu resendos. [1]

Forster 1 1/2 Ĉ. P. Motorbiciklo

Garantio: 12 monatoj. Modelo 1924



1 cilindro, 2-takta, 140 kcm, 2 transmisiiloj, liberrado, kupligo kaj oportuna rimen-streĉado, vetur-rapideco 10-60 km pohoro; suprenirpovo ĝis 20%. Esenc-konsumo ĉirkaŭ 1 litro da benzino kaj 1/4 oleo po 50 km.

Tuj liverbla el provizejo.

Prospektoj (germane kaj france) kaj informoj senpage haveblaj de

Gebr. Forster, fabriko de Motorbicikloj

Hinwil (Zürich), Svislando

Seriozaj pagokapablaj reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo

Legu la libron:

Milionoj da homoj nun vivantaj neniam mortos!

Ĉiu vera esperantisto estas idealisto kaj fil nepre devus posedeti tiun ĉi libron, laŭ kies enhavo la plej ideala ora epoko de la homaro estas en kruso ĉi tiu nun, kiu kruzis stato de la mondo, kiu estos sekvata de la plej bonaj kaj plej favoraj imagotaj cirkonstancoj sur la tero. Ĉiuj klarigis bazas sur la Biblio kaj siaj profetioj por la Regno de Dio sur la tero. — Prezo 1.25 sv. fk. aŭ 1.—or. mk. — Mendo ĉe

Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo, Esperanta Fako, Landstr. 277, Rieden bei Baden, Svislando.

Poŝtekkontoj: Anru VI, 1905, Karlsruhe 70256.

Membroj en pli ol 40 landoj

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, papermonojn ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postulu propoŝton kontraŭ respondokupon de s-o

F. Jakobi, Bahnhofstrasse 29, Coblenz - Germanujo



Saĝaj sinjorinoj!

Atentu, se vi uzas rimedojn kontraŭ malhelpejo en la menstruacio! — Estu singardaj por oferto, kiuj nur s-o malofte plenas laŭ, kion ili promesas! — S-o Savao kaj novan vivogojon alportas mial de jandokaj provitaj special-rimedioj. Ili forigas malsanemajn ekhaltojn, kiuj povas viti vin al mial-esperoj. — Ili ankaŭ helpas en malfacilaj statoj. Plej simpla uzo, garantite sen mialto. Neniu malhelpejo al laboro. Mutaj libervoloj kaj koraj dankiletoj pravas la sukceson, konstateblan ofte jam post nur kelkaj horoj. Sendado districte per rembursoj. Ĉu vi suferas? Se jes, skribu ankoraŭ hodiaŭ al

Higiena entrepreno: W. Heilmann, Bellealliancestr. 46, Hamburgo 19/947.